# La Pacdefendanto

N-o.7. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO JULIO 1952

## ONI SERĈAS KOMUNAN LINGVON

Dum la lasta tempo aperis en la usonaj kaj anglaj gazetoj,inklusive la soldat-revuoj multaj artikoloj,dediĉitaj al diversaj lingvaj problemoj/tradukado,komparo de karaktero de unuopaj lingvoj kaj simile/.Tiu ĉi ne atendita intereso pri lingvistiko tute ne havas sciencan karakteron. Ĝi konsekvencas el„blinda strateto"/stagnacio/,kiun atingis la demando de komuna lingvo por la malfeliĉe popularigita „Eŭropa Armeo".

Pentagon ne kontraŭus tion,ke la „Eŭropa Armeo" ĝevu paroli la anglan lingvon,ja ĝi devos akcepti komandojn de usona estro kaj batali por la usonaj interesoj. Sed por ellerni la anglan lingvon eblas nur allogi la„marshaligitajn" ministrojn kaj generalojn,kiuj estas kutimaj,strikte lerni la taskojn el Washingtono. Koncerne la simplaj Francanoj, Italoj,Germanoj,Belgoj kaj Nederlandanoj,tiuj neeblas aldevigi, ke ili forlasu sian gepatran lingvon.Ilia scio de angla lingvo gis nun limigas per la flugvortoj:„Yankee go home"!/„Amerikanoj iru hejmen!"/kiujn tiutempe ripetadas la tuta okcidenta Eŭropo. Tio certe ne sufiĉas por garantii la por Pentagon necesan harmonion en la „Eŭropa Armeo".

Elirejon el tiu„blinda strateto" kiun eniris la penado de la lingvistoj el Pentagon,rekomendis antaŭ nelonge la angla soldatarevuo„The Army Quarterly".Ĝiaj redaktoroj jam antaŭe refuzas la opinion,ke la usona militista kliko/rondo/akceptus por la„Eŭropa Armeo"iun ajn eŭropan lingvon.Samtempe tiu ĉi revuo konstatas,ke„ĉiuj naciaj lingvoj estas tro nefacilaj,por ke ilin mez-kvalita soldato kapablu ellerni dum prudenta tempotermino" kaj rekomendas kiel savilon,Esperanton.Laŭ la opinio de„The Army Quarterly"posedas tiu ĉi artefarita kosmopolitika ĵargono finfine vicon da valoraj avantaĝoj,kompare kun la naciaj lingvoj.Esperanto, kiel skribas la revuo,estas por ĉiu,kiu bedaŭrinde ne havis okazon akiri plibonan klerecon facile lernebla" kaj„ facile ĝin lernas la koloraj rasoj",samtempe Esperanto prezentas la eblecon ekstermi el la „Eŭropa Armeo"la gentojn de la nacia nemkonscio. Ĉi lastan opinion ni legas en la angla revuo inter la linioj/kaŝite/,sed la usonaj gazetoj ĝin esprimas publike.La transmara gazeto„Post Dispatch"antaŭ nelonge skribis en komanda tono pri la nepra neceseco„konvinki la oficirojn kaj soldatojn,ke unuavice ili estas Eŭropanoj kaj ĝis poste civitanoj de apartaj landoj.

La plejnovaj eksperimentoj,galvanizi Esperanton kiel komunan lingvon por la „Eŭropa Armeo", kiun la USA flikkonstruas,apenaŭ faciligos la taskon de imperialistoj ekkomenci atakon.La pac - amantaj eŭropaj nacioj ne havas nek havos komunan lingvon kun la milit-provokantoj!

Jen traduko de artikolo el ĉeĥlingva eldono de semajna revuo „NOVÁ DOBA"/Nova tempo/,internacia revuo,kiu estas eldonata en rusa,ĉeĥa,angla,franca,germana, hispana,pola kaj sveda lingvo kies ĉefredakcio troviĝas en Moskva,Arbat,Kalašnyj per.12 kaj

la ĉeĥa eldonejo en Praha XII, Stalinova 46, Ĉeĥoslovakio.

En tiu ĉi artikolo vidiĝas du malamikoj de Esperanto; la unua „The Army Quarterly", kiu opinias uzi Esperanton kiel ilon por reciproka fratmortigado kontraŭ la destinita celado de ĝia kreinto, d-ro. L.L. Zamenhof k la dua, kiu faras el ĝi artefaritan, kosmopolitikan ĵargonon kaj lingvon de militprovokantoj kun kiu la pacamaj eŭropaj nacioj havu nenion komunan.

Ni, klaskonsciaj esperantistoj povas aprobi nek la unuan, nek la duan aspiron. Esperanto mem, portas en si la impulson al paco, amo kaj frateco inter la nacioj. Povas esti, ke kelkaj ruzuloj lernas Esperanton kun la celo, disseni per ĝi malamon kaj militon, sed tiuj certe ne longe havos lokon en niaj vicoj kaj baldaŭ demaskiĝos. Ni akceptu ke ili sukcesos instigi la diverslingvajn soldatojn de la „Europa Armeo" al lernado de Esperanto, sed tiam okazos, ke tiuj nepre krios „Yankee go home!" sed Amerikanoj iru hejmen! kaj la kosmopolismo en la senco de la usonaj „Superhomoj" fariĝos kosmopolismo de paco kaj tutmonda socialismo. Same ne pravas tiuj, kiuj insultas Esperanton, arte-faritan kosmopolitikan ĵargonon, kun kiu havu la eŭropaj pacamaj nacioj nenion komunan. Ekzistis kaj ekzistas ankoraŭ multaj nacilingvaj ĵargonoj kaj neniu socialiste pensanta homo kuraĝus tiujn ĵargonojn sufoki. Male, socialismo devas garantii plenan evoluon al ĉiu nacio, eĉ al la plejmalgranda, kaj helpi kompletigi ilian ankoraŭ ne sufiĉe evoluitan lingvon kaj kulturon.

Esperanto, mem, ne estas ĵargono. Pere de ĝi eblas esprimi la plej delikatajn sentojn, pere de ĝi eblas paroli la plej novtempajn esprimojn. Esperanto jam montriĝis kapabla por ĉiutema pritraktado dum multaj internaciaj kongresoj sen kripliĝita traduko de nesinceraj aŭ ne kapablaj interpretistoj. Esperanton jam praktike uzas centmiloj da homoj en ĉiuj partoj de la mondo. Ĝi absolute ne estas lingvo de malpliklerej homoj, kiel skribas laŭ „NOVA DOBA" la revuo „The Army Quarterly", sed male, ĉiu klera, progresema homo scias tiun lingvon aŭ penas almenaŭ kun ĝi interkonatiĝi, antaŭ ol li ekkuraĝas ĝin kritiki. Kaj ni povas kun trankvileco aserti, ke tiu kiu foje spertis la avantaĝojn, kiujn prezentas al li Esperanto en la afero por la pacdefendo k. propagando de pli bona estonteco neniam plu konsideras ĝin kiel artefaritan, kosmopolitikan ĵargonon. Kaj se homo, ne sufiĉe klera por lerni dekduon da nacilingvoj sukcesos ellerni Esperanton, li certe pli frue aŭ malplifrue fariĝos pli klera kaj vastvida ol tiuj, kiuj kapablas paroli multajn lingvojn kaj disponas sian kapablecon nur unusole por sia persona avantaĝo kaj profito.

Certe, ke la pacamaj popoloj de de Eŭropo, ni diru de la tutmondo, neniam havos komunan lingvon kun la militinstigantoj, ĉar la militinstigantoj trovos inter ni lokon kaj obeemajn aŭskultantojn. Ili trankvile propagandu nian lingvon, la rezulto estos la sama, kiel iĝi lerni la soldatojn dekduon da nacilingvoj, aŭ la rusan. Kontraŭ la progreso eblas starigi barojn-sed ĉu tiuj baroj estos venkeblaj ?- tion al ni montros la estonto.

Rud. Burda

## JÓN RAFNSSON DUM LA MAJFESTO EN REJKJAVIK :

La 1. de majo 1945 ni kunvenis sub jenaj losungoj: "Neniam plu senlaborecon, rekonstrui nian ekonomion kaj fortigi nian memstarecon!" Tiel ni volis garantii la pacon. La islanda popolo per sia unuiĝita forto povis influi la decidon de la direkto de la nacia ekonomio. Milionoj da militprofito estis uzataj por fortigi la ekonomian vivon. Multproduktablaj, novaj fabrikiloj venis en la landon. Malnovaj eksterlandaj, monopolaj katenoj estis rompataj de sur nia eksporta komerco, kun la rezulto, ke subite la prezo de nia ĉefa eksportvaro, /la fiŝoj/ altiĝis je duono aŭ pli.

Daŭrigo ~~de Rafnsson-parolado en~~ Rejkjavik:
En la lando estiĝis plia bonstato ol iam antaŭe en la historio de la lando.
Sed kion ni nun vidas en la lando dum tiu internacia batala tago de la laboristaro?- Tio,kio precipe karakterizas la tagon en la landoj kie la popoloj mem regas,estas la ravo pri paca konstruado kaj kreskanta bonfarto unuflanke kaj aliflanke la postulo povi vivi pace en sia lando.
Sed en la kapitalistaj landoj la tagon karakterizas protestoj de la popoloj kontraŭ senlaboreco,altaj prezoj,armigado kaj kapitalistaj militinstigoj,kune kun la postulo haviĝi al si laboron,panon kaj pacon.Ĉe ni ni la mienon de la tago precipe kreiĝas protestoj de la popolo kontraŭ la senlaboreco,kontraŭ la prezalteco kaj malaltaj salajroj,kontraŭ baroj de pruntado en bankoj,kontraŭ eksterlanda perfortigo en komercaj aferoj,kontraŭ nacia mallibereco ktp.
La postmilita rekonstruo de la nacia ekonomio estis bedaŭrinde tro mallongdaŭra.La ekonomia vivo de la lando estas multe malfortigata. La malvarma nano de senlaboreco subpremis la vivon de la nacio kvazaŭ inkuba monstro,la prezaltigo rompis ĉiujn tarifojn.La vivstandardo de la laboranta popolo,t.e.de la plejmulto,malaltiĝis ĝis la mizera stato,la krizo inter militoj. Multvaloraj eksportmerkatoj estas aŭ perditaj aŭ malfermitaj de eksterlandaj kapitalistoj.Pruntbara krizo premas la islandan industrion ĉe la kolo dume eksterlandaj varoj pleniĝas la islandajn varejojn.Eksterlanda armeo sin hejmiĝas en nia lando kaj nestumas kiel en sia propra lando.Nuntempe neniu decido estas prenata en niaj aŭtoritataj aferoj,escepte iu pridiro kaj interveno de fremda regno. -
Kia ŝanĝo!
Ekzistas homoj,kiuj diras,ke la tempoj estas tiaj kaj nenio povas esti farata por rebonigi tiun staton.Al tiuj mi volas memorigi,ke tuj en 1944 montriĝis al ni la samaj perspektivoj kaj fine sekvis la plejbonaj tempoj en la historio de nia lando,pro tiu kaŭzo, ke celkonsciaj,sindikataj konfederacioj decidis la direkton kaj ne reakciuloj kaj prezaltigantoj. Fakto estas,ke la homoj mem kreas la bonan aŭ malbonan vivstaton.Honeste dirate;La batalo por la paco estas batalo por plibona aŭ plimalbona vivo.Kvankam la sindikatoj atingis multajn venkojn, ili tamen devis iom retroiri por kelka tempo.Ili neplu kundecidas la iron de la nacia politiko.Riĉulaj rondoj prenis la direktilon.Ĉiujn malvenkojn en la ekonomia batalo sekvis limigoj de nia nacia sendependeco.
Por solvi ĉi problemon ekzistas nur unu rimedo;vidi ĝin en la vizaĝon,ekkoni ĝian radikon kaj originon.Kaj la radiko estas jena: Ni komisiis la regadon al ti-kiuj ne havas komunan intereson kun la popolo,la laboristamaso kaj al kiuj estas egala la islanda sendependeco.
Mi estas konvinkata ,ke ni venkos tiun problemon,ni kreos bonan vivstandardon kaj asekuros la pacon.
Ni povas disputi pri vivkonceptoj,politika sagaceco,sed pri unu afero ne eblas disputi:La popolo havas la rajton labori kaj vivi homdecan vivon.Nia lando estas sufiĉe riĉa por ke tiel povu esti.
Pri tiu ĉi primitiva postulo ni povas kaj devas esti unuiĝitaj !

Trad.el islanda lingvo
k-do.Hannibalson

## LA AMSTERDAMA JUNULARO VEKIĜAS

Junaj laboristoj de la amsterdama „Okcidenta sukerrafinejo"/W.S.R./ alvokis la junularon de Nederlando kaj tutmondo al amasunuiĝo por defendi siajn rajtojn.En la alvoko ili proponas,ke la junularo arangu kaj partoprenu internacian konferencon por defendi siajn rajtojn.Ne miriĝas,ke ilia alvoko trovis ehon en ĉiuj tavoloj de la nederlanda junularo.La alvoko estas konsiderata kiel plejtaŭga respondo al la konstante malboniĝanta situacio,kiun eniras la nederlanda kaj kapitalistlanda junularo. /daŭrigo sur 4.pago/

Junaj terkulturistoj,konstrulaboristoj,teksajlaboristoj,gejunuloj el preskaŭ ĉiu nederlanda industrio estas minacataj de senlaboreco.Senlaboreco signifas por junaj homoj,kiuj ricevas nenian subvencion,forprenon de ebleco realigi siajn planojn por la estonto.

En Nederlando regas grandega lo-ĝejmanko.Gejunuloj nepovas fondi familion.Estas neebla por ili pro-fundajn deziroјn efektivigi.

La malaltigo de la aĉetpovo same grade tuŝas la junularon.Dum oni pagis al la plenkreskuloj salajro-altigon,kiu cetere nur parte rekompencis la prezaltigon,ricevis la junaj laboristoj malpli aŭ tute nenion.Al junaj artistoj fariĝas ĉiam pli malfacile,kulturi si-an arton.Multaj junaj studentoj devas krom la studo ankoraŭ labori,por povi pagi la ĉiam altigantajn kostojn,ligitajn kun la studado.

Ĉio ĉi estas ombrata ankoraŭ per konstante minacanta dangero de nova milito.El la vicoj de la junularo oni tial postulas soldatojn.La akuteco de ĉi tiu dangero montriĝas tute klare en la plilongiĝo de la soldatserva tempo kaj en la grandskalaj ripetekzercoj,kiuj okazos ĉi jare.Soldatojn,kiuj jam finis la servon,oni forprenas por longa tempo el ili-a profesio aŭ studo,por ekzerci dum somero en Okcident-Germanio.

Jen parto el multe pliamplek-sa alvoko de la amsterdama junularo.

Kunlabor-proponojn kaj simpati-leterojn sendu al:

Manna Beyne-van Cs.
van Boetselaerstraat 58, Amsterdam,Nederlando.AMSTERDAM-WEST.

EL ĈINA ESPERANTO LIGO :

Koncerne la korespondado inter ĉeĥoslovakaj kaj ĉinaj infanoj, estis transdonita propono al la demokr.junular-ligo de Ĉinio k. al la interrilata buroo por kulturaj aferoj kun eksterlando. pri la respondo ni informos vin.

PUBLIKA DISKUTO

La Ĉina Esperanto-Ligo en Peking arangos publikan diskuton pri la valoro de Esperanto; ĉu ĝi estas konforma al la lingvaj teorioj de k-do.Stalin;ĉu ĝi havas la eblon ekzisti kaj evolui,ktp.

Ni firme kredas,ke la ĉinaj kamaradoj bone sukcesos per tiu ĉi entrepreno,kiu signifus por niaj klaskonsciaj esperantistoj fortan apogilon en la batalo kontraŭ la diverslandaj malamikoj de nia lingvo.Car ,se ĉinaj prominentuloj diskutos favore,klarigante la tesojn de k-do.Stalin favore al Esperanto,ne tiom facile plu iu kuraĝos liajn esprimojn deklari kontraŭ ni.Ni ĉiuj avide atendas la rezulton kaj deziras multan sukceson.

ĈU NENIO NOVA ?

Kun intereso legas niaj legantoj la rubrikon „NIA MOVADO",sed bedaŭrinde tiufoje la rubriko tute ne plenumas sian taskon.Estas fakto,ke en ĉiuj lokoj de nia lando niaj kamaradoj laboras,okazigas kursojn,prelegojn,korespondas kaj interkontaktigas ankoraŭ aliajn neesperantistajn grupojn.Okazas ekspozicioj,prelegoj ktp.,sed al nia domago la k-doj.forgesas pri tiuj per kaj por esperantaj laboroj raporti al nia redakcio.Certe la redakcio ne ankoraŭ estas televiza,por mem vidi kaj aŭdi ĉiun okazintaĵon en la Esperanto-movado de nia lando.

Kiel multe pli interesa estus nia rubriko,se el ĉiu loko de nia lando venus regule raportoj pri nia movado.Skribu al ni pri ĉiu nova kurso,kiu okazos!kiom da lernantoj kiel vi instruas,kiom da lekcioj vi faras kaj kiom da kursanoj ĝis fine restis!Raportu pri viaj kunvenoj,diskutoj,prelegoj,kiom da leteroj vi ekspedis ĉiu monate al eksterlando,kiom da infanleteroj! Ĉu iu kontraŭas vian movadon?Ĉion ĉi avide legas niaj ekster kaj enlandaj k-doj.Raportu,raportu tuj!

## AL LA JAPANA KOMUNISTA PARTIO

Karaj gekamaradoj!

En la nomo de la progresemaj ĉeĥoslovakaj esperantistoj ni sen -das al via partio kaj la pacama japana popolo multajn korsalutojn kaj bondezirojn okaze de la 30 ja -ra ekzisto de la Japana Komunista Partio.

Ni,kaj kun ni,la tuta ĉeĥoslovaka popolo kun granda intereso sekvas vian ĉiutagan batalon por la liberigo kaj sendependeco de la japana popolo,kontraŭ la agresa kaj nehoma,bakteria milito en Koreio kaj por la tutmonda paco.

Ni estas firme konvinkataj,ke la oferoj alportataj de viaj plej bonaj filoj de la japana popolo por la garantio de la paco kaj kontraŭ la militinstigantoj ne es tas vanaj kaj la tempo ne estas malproksima,kiam ankaŭ la japana popolo gaje festos sian liberigon.

Ni deziras al via plua laboro kaj batalo multajn sukcesojn kaj baldaŭan venkon!

kamarade por la progresemaj esperantistoj en Ĉeĥoslovakio: La redakcio de „La Pacdefendanto"

## LETERO al la REDAKCIO

......sed plimulte interesis min via cerkulero„La Pacdefendanto", modesta reprezentanto de nia vekiganta Esperanto-movado.

Mi mem,kiel izolulo,estis dum la lastaj monatoj tre malmulte in -formita pri la stato de nia movado kaj post la sciigo,ke la E.-klubo en CHEB,kiun mi en la jaro 1946 kun k-do.Patera fondis kaj en multaj kursoj edukis vicon da novaj adeptoj,disiris,tiam mi pre -skaŭ perdis la esperon pri vivkapableco de E-movado ĉe ni.Ĉiuj veraj esperantistoj sentis jam de longe,ke al la Esp.-organizoj en nia lando mankas celkonscia gvidantaro,kiu envicigus nian esperantistaron en efektivan vivon de nia popolo.Tiukaŭze ankaŭ la respondecaj esp-istoj„malfruigis la vagonaron" kaj ni kun ili. Post la februaro 1948.estis jam klara, ke la esperantistoj devas eliri el siaj klubejoj inter la popolo por servi al ĝi per Esp-o.

Ŝajnas pedanteco disputi pri la vortetoj p e r kaj p o r. Sed tiu ĉi kverelo povus esti nia ~~tra~~ tragedio.Sendiskute ni devas servi kaj labori p e r Esperanto p o r la popolo.Ĝuste vi diras, ke se ni praktike kaj sukcesplene laboras per Esperanto,tiam logike kaj sekve rezultos samtempe propagando por Esperanto.

Mi ne subtaksas instruadon de la lingvo,sed ankaŭ la instruado kaj konversacio devas havi celon,ne sole la lingvoscion.Evidente nia laboro povas esti sukcesa,kiam ni ĉiuj laboros kune,alidirite la esperantistoj en nia lando devus havi la ideon kaj propagandan gvidantaron./ĉu en formo de esp-ista packomitato?/...........

Roman Bystřický.
Plesné 310 u Chebu.

## ĈU VI VOLAS AĈETI ESPLIBROJN ?

Ni ĵus ricevis pligrandan kvanton de niaj k-doj.el ĈINIO 196 paĝa broŝuro„Por nova afero - nova maniero"-noveloj el popola Ĉinio,havebla por 20.-Kčs kaj 56 paĝa libreto„La plejforta voĉo de la paco",ĉinaj poemoj,por 10.-Kčs.

Laŭ la mendota kvanto vi devas al -doni sumon por la poŝtafranko.

Al eksterlandaj gekamaradoj ni povas liveri kontraŭ pago per samvaloraj Esperanto-libroj.Memkompreneble ni akceptas nur rekompencon de progresemaj,socialist kaj pac-tendencaj esperanto-libroj.

LA ALBUMO DE ORIENTEUROPAJ PACBATALANTAJ KARIKATUROJ -

el Ĉinio ankoraŭ ne atingis nian redakcion.Pro tio ni petas la kamaradojn,kiuj jam mendis ĝin ,ke ili restu paciencaj.Tuj post la ricevo ni dissendos al ĉiu mend - into.

## ATENTIGO

Ĉiun korespondaĵon kaj pagojn sendu rekte al:K-do.Rud.Burda.PLZEŇ-Palackého nám.6.Ĉeĥoslovakio.

## N I A M O V A D O

OSTRAVA-ZÁBŘEH,post plendo de k-do.Kubala Alois el Ostrava ni korektigas nian ~~lastan~~ raporton pri la inaŭguro de ~~Esperanto~~-monumento en tiu urbo en la sen-co,ke ankaŭ k-do.Kubala Alois estas unu el la fondintaj membr-oj de la E.-societo Komenský kaj ankaŭ li havis paroladon okaze de la inaŭguro de tiu monumento en Ostrava-Zábřeh. Red.

DĚČÍN,nia Esperantofako če la sindikata uzina kultura klubo de fervojistoj przentis al 320 par-toprenintoj la lumbildparoladon de k-do.Burda:„Činio kaj la bakteria milito en Koreio".Esperanto donis al ni praktikan okazon vorte eč bilde alproksimigi niajn samurbanojn al la heroa čina popolo kaj propraokule vidi dokumentajn fotojn pri la kruelajoj fare de la usonaj imperialistoj en Koreio.Ni estas konvinkitaj,fari bonan laboron rekomendanté či paroladon ankaŭ al la ceteraj Esperanto-rondetoj.La saman paroladon ni ankoraŭ ripetis kun bona sukceso por lernejinfanoj. Růžička

ROŽNOV,la 4.somera Esperanto - kursaro okazos de la 12-26 julio 1952.Pri gia organizado zorgas la JUNULARO EN OSTRAVA.Kiu aligos gis fino de junio ricevos 50 procentan fervojrabaton. Detalan informon petu če k-dino: Milada Strakošová,Edisonova č.l. Ostrava-Hrabůvky.

OPAVA, La Esperanto-Junularo arangos de la 3.-16.aŭgusto 1952 če la rivero Moravice grandan Esperantistan tendaron kun kursoj kaj amuzoj. 14 taga restado kun mango kaj ekskursokostoj faros 800.- 1000.-Kčs elspezon. Kiu aligos antaŭ la 15.julio ricevos fervojrabaton de 50 %. Skribu al k-dino: Kuzníková Blaž. Rooseveltova č.17, OPAVA.

PLZEŇ,la komitata kunveno decidis arangi por lernejinfanoj specialajn Esperanto-kursojn dum la someraj ~~lernvagancoj~~.Instruos kamarado Josef Reiser kaj k-dino.Pavl. Maroušová.En la monato junio niaj infanoj ekspedis 48 leterojn al infanoj de Činio,Anglio,Polio,Japanio,Francio,Svedio,Germanio kaj Islando.Saman kvanton ili ricevis de infanoj eksterlandaj.

PLUAJ RAPORTOJ NE ALVENIS

## K O R E S P O N D I

### D E Z I R A S :

K-do.Niilo Kavenius - el TURKU, Finlando petas nin,sciigi al niaj legantoj,ke li,kiel peranto de„El Popola Činio",ne povas akcepti korespondpetojn,kiuj lin atingas multnombre el Čehoslovakio.Li estas plene okupata per alia pli grava laboro.Bonvolu tion sciigi al la korespondemuloj.

K-do.Václav K a p r á l, PLZEŇ - Nerudova ul.10.,Čehoslovakio,interšangas il.p.k.kaj p.m. Al čiu propono li nepre respondos.

K-dino. Věra B o r s k á,operkantistino,Hlinky č.6, BRNO,Čehoslovakio.deziras korespondi čefe kun činaj kaj japanaj ge-kdoj. Si gvidas Esp.-kursojn por infanrondetoj kies anoj tre deziras ricevi adresojn de korespondemaj infanoj el čiuj landoj.Skribu tuj al la supra adreso!

Knabino,Jar.Novotná/12j/ Hlinky č.69,BRNO,Čehoslovakio,koresp. kun čiuj landoj.

K-dino.Libunjo Šebková,Žabovřecky Šmejkalova 93,BRNO,Čehoslovakio, precipe kun Činio.

K-do.Ingeniero Frant.Netík, 30jara Gottwaldovy závody,Královo Pole,Křižíkova 68,Čehoslovakio. kun čiuj landoj.

Eldonas : Osvětová Beseda -Kroužek Esperantistů v P L Z N I .
Redakcio : K-do.Rudolf B U R D A , Palackého nám.č.6, P L Z E Ň .
Č E Ħ O S L O V A K I O